

45 KOLEKTO DE POŝTMARKOJ

„Jen sankta vero," diris maljuna sinjoro Karas. „Se oni foliumus en sia pasinteco, oni trovus en ĝi sufiĉe da temoj por tute aliaj vivoj. Foje... ĉu pro eraro, ĉu pro inklino... oni elektis nur unu el ili kaj finvivas ĝin; sed la plej malbona estas, ke la aliaj, la eblaj vivoj ne estas tiel definitive mortaj. Kaj iam okazas, ke en ili vi eksentas doloron kiel en amputita kruro.

Kiam mi estis proksimume dekjara bubo, mi komencis kolekti poŝtmarkojn; la paĉjo ne ŝatis tion vidi, li opiniis, ke pro ili mi malbone lernos, sed mi havis amikon, Alojzon Ĉepelka, kaj kun tiu mi omaĝis al la filatela pasio. Alojzo estis filo de gurdisto, hirta kaj lentuga knabo, taŭzita kiel pasero, kaj mi amis lin, kiel nur infanoj scias ami amikon.

Aŭskultu, mi estas maljuna homo; mi havis edzinon kaj infanojn, sed mi diras al vi, ke neniŭ homa sentimento estas tiel bela kiel la amikeco. Sed tion oni kapablas nur dum oni estas juna; poste oni iel krustiĝas kaj egoistiĝas. La amikeco fontas nurnure el entuziasmo kaj admiro, el vivabundeco, el abunda kaj supermezura sento; oni havas ĝin tiom, ke necesas ĝin al iu donaci.

Mia paĉjo estis notario, kapo de la loka elito, ege digna kaj severa sinjoro; kaj mi enfermis en mian koron Aloĉjon, kies patro estis drinkema gurdisto kaj patrino laborkonsumita lavistino, kaj tiun Aloĉjon mi estimis kaj adoris, ĉar li estis pli lerta ol mi, ĉar li estis memstara kaj kuraĝa kiel rato kaj ĉar li havis surnaze lentugojn kaj ĉar li sciis ĵeti ŝtonojn per la maldekstra, mi ne scias plu, kion entute mi amis ĉe li; sed certe ĝi estis la plej granda amo de mia vivo.

Aloĉjo estis mia konfidenculo, kiam mi komencis fari al mi kolekton da poŝtmarkoj. Iu diris ĉi tie, ke nur viroj havas komprenon por kolektoj;

45 SBÍRKA ZNÁMEK

„To teda je svatá pravda," ŝekl starý pan Karas. „Kdyby se člověk hrabal ve své minulosti, našel by, že v ní je dost látky na docela jiné životy. Jednou... buď omylem, nebo z náklonnosti... si vybral jenom jeden z nich a dožívá jej až do konce; ale nejhorší je, že ty druhé, ty možné životy nejsou tak docela mrtvé. A někdy se stane, že v nich pocítíš bolest jako v uříznuté noze.

Když jsem byl asi desetiletý kluk, začal jsem si dělat sbírku známek; tatínek to nerad viděl, myslel si, že se budu pro to špatně učit, ale já měl kamaráda, Lojzika Ĉepelku, a s tím jsem holdoval té filatelistické vášni. Ten Lojzík byl syn flašinetáře, takový střapatý a pihovatý kluk, rozdrbaný jako brabec, a já ho miloval, jak dovedou jen děti milovat kamaráda.

Poslouchejte, já jsem starý člověk; měl jsem ženu a děti, ale já vám řeknu, že žádný lidský cit není tak krásný jako přátelství. Ale toho je člověk schopen, jen dokud je mladý; pak tak nějak okorá a zesobečtí. Takové přátelství, to prýští čistočistě z nadšení a obdivu, z přebytku života, z hojnosti a přemíry citu; máš ho tolik, že jej musíš někomu darovat.

Můj tatík byl notář, hlava místní honorace, strašně důstojný a přísný pán; a já pojal do svého srdce Lojzika, co jeho otec byl ožralý flašinetář a matka zedřená prادلena, a já toho Lojzu ctil a zbožňoval, protože byl šikovnější než já, že byl takový samostatný a udatný jako krysa a že měl na nose pihy a že házel kameny levičkou, já už ani nevím, co všechno jsem na něm tak miloval; ale jistě to byla největší láska mého života.

Teda ten Lojzík byl mým důvěrníkem, když jsem si začal dělat sbírku známek. Tady někdo ŝekl, že jenom mužští mají smysl pro sbírky;

tio estas vero; mi opinias, ke ĝi estas postresto aŭ instinkto el tempoj, kiam ĉiu viro faris al si kolekton el kapoj de siaj malamikoj, rabakiritaj armiloj, ursfeloj, kornaro kaj entute el ĉio predebla. Sed la poŝtmark-kolekto estas ne nur proprajo; ĝi estas eterna aventuro; oni kun ia tremo tuŝas peceton da iu fora lando, ekzemple de Bhutano, Bolivio aŭ Kabo de Bona Espero; simple oni havas kun la ekzotaj landoj kvazaŭ ian personan kaj intiman rilaton. En la kolektado de poŝtmarkoj estas motivoj por la vojaĝado kaj marnavigado kaj entute por la vira aventuro pri la mondo. Same kiel en la krucistaj militiroj.

Kiel mi diris, mia patro ne vidis tion ŝate; la patroj kutime ne ŝatas vidi, se iliaj filoj faras ion alian ol ili mem; sinjoroj, al miaj filoj ankaŭ mi ne estis pli bona. La patreco estas entute ia miksitaj sentimento; en ĝi estas granda amo, sed ankaŭ ia antaŭjuĝo, malkonfido, malamikeco, mi ne scias, kiel esprimi tion; ju pli oni amas siajn infanojn, des pli da alia sento enestas. Mi devis min kaŝadi kun mia kolekto de poŝtmarkoj en subtegmento, por ke la paĉjo ne surprizu min; en la subtegmento estis malnova kesto, tiel nomata farunujo kaj en ĝin ni enrampis kiel du musetoj kaj montradis al ni la poŝtmarkojn: Rigardu, jen Nederlando, jen Egiptio, ĉi tio estas Sverige aŭ Svedio. Kaj ĉar ni devis nin tiel kaŝadi, estis en ĝi io eĉ peke bela.

Kiel mi havigadis al mi la poŝtmarkojn, tio estis alia aventuro; mi vizitadis konatajn kaj nekonatajn familiojn kaj trudpetis, ke mi darfu malglui markojn desur iliaj malnovaj leteroj, sporade en ia subtegmento oni havis tirkestojn plenaj de malnovaj paperoj; tio estis miaj plej feliĉaj horoj, kiam mi, sidante sur la planko, traserĉadis la polvokovritajn paper-amasojn kaj serĉis sur ili ian poŝtmarkon, kiun ĝis nun mi ne havis, mi azeno nome ne kolektis duplikatojn; kaj kiam okazis, ke mi trovis malnovan Lombardion aŭ mi ne scias kiun el la germanaj ŝtatoj aŭ liberaj urboj, mi sentis preskaŭ turmentan ĝojon - ja ĉiu grandega feliĉo tiel dolĉe doloras.

je to pravda; já myslím, že to je pozůstatek nebo pud z těch dob, kdy si každý mužský dělal sbírku hlav svých nepřátel, uloupených zbraní, medvědích koží, jeleních parohů a vůbec všeho, co mohl ukořistit. Ale taková sbírka známek, to není jenom vlastnictví, to je věčné dobrodružství; člověk jaksi s chvěním se dotýká kousku té daleké země, řekněme Bhútánu, Bolívie nebo mysu Dobré naděje; prostě má s těmi cizokrajnými zeměmi něco jako osobní a důvěrný styk. Teda on je v tom sbírání známek takový motiv cestování a mořeplavectví a vůbec té mužské světové dobrodružnosti. To máte jako v těch křížových výpravách.

Jak jsem říkal, můj otec to neviděl rád; otcové obvykle neradi vidí, dělají-li jejich synové něco jiného než oni sami; páni, já byl k svým synům také takový. Ono je otectví vůbec jaksi smíšený cit; je v něm veliká láska, ale taky nějaké zaujetí, nedůvěra, nepřátelství nebo jak bych to řekl; čím víc člověk své děti miluje, tím víc je v něm toho druhého citu. Teda já jsem se musel s tou mou sbírkou známek schovávat na půdě, aby mně na to tatík nekápl; na půdě byla stará truhla, takzvaná moučnice, a do té jsme zalezli jako dvě myši a ukazovali si známky: Koukej, tohle je Nizozemsko, tohle je Egypt, tohle je Sverige neboli Švédsko. A že jsme se s těmi poklady tak museli schovávat, v tom bylo něco až hříšně krásného. Jak jsem si ty známky opatřoval, to bylo jiné dobrodružství; já chodil po známých i neznámých rodinách a škemral, abych si směl odlepit marky z jejich starých dopisů. Tu a tam měli někde na půdě nebo v sekretáři plná šuplata starých papírů; to byly mé nejbláženější hodiny, když jsem, sedě na zemi, probíral ty zaprášené kupy lejster a hledal na nich nějakou známku, kterou jsem dosud neměl, já osel jsem totiž duplikáty nesbíral; a když se stalo, že jsem našel starou Lombardii nebo já nevím který z německých státeků nebo svobodných měst, já cítil radost přímo mučivou - ono každé nesmírné štěstí tak sladce bolí.

Kaj dume ekstere atendis min Aloĉjo, kaj kiam fine mi eliris, tuj en la pordo mi flustris: Aloĉjo, Aloĉjo, estis tie unu Hanovero! - Ĉu vi havas ĝin? - Jes! - kaj jam ni kuregis kun nia akiraĵo hejmen, en nian keston. Ĉe ni estis teksfabrikoj por ĉiaj malkaraĵoj, por juto, kalikoto, katuno, kaj kotona varaĉo; tiu fuŝvaro estas ĉe ni speciale fabrikata por la koloraj rasoj de la tuta terglobo. Kaj tie oni permesis al mi serĉi poŝtmarkojn en paperkorboj; tio estis mia plej riĉa ĉasejo; tie estis trovebla Siamo kaj Sud- Afriko, Ĉinio, Liberio, Afgano, Borneo, Brazilo, Nov-Zelando, Hindio, Kongolando - mi ne scias, ĉu jam nuraj nomoj sonas al vi iel mistere kaj kvazaŭ sopire. Dio, kia ĝojo, kia senbrida ĝojo, kiam ekzemple mi trovis poŝtmarkon el Straits Settlements - Aŭ Koreo! Nepalo! Novgvineo! Sieraleono! Madagaskaro! Aŭskultu, tian ekstazon povas kompreni nur ĉasisto aŭ trezorserĉanto aŭ arkeologo entreprenanta la elfosadon. Serĉi kaj trovi, jen la plej granda streĉo kaj kontentigo, kiun povas la vivo doni al homo. Ĉiu homo devus ion serĉi; se ne la poŝtmarkojn, do la veron aŭ oran filikon aŭ almenaŭ ŝtongsagojn kaj urnojn.

Tio estis la plej belaj jaroj de mia vivo, la amikeco kun Aloĉjo kaj kolektado de poŝtmarkoj. Poste mi malsaniĝis je skarlatino kaj oni ne allasis Aloĉjon al mi, kvankam li staradis ĉe ni en koridoro kaj fajfis, por ke mi aŭdu lin. Foje oni ne atentis min; unuvorte mi fuĝis el la lito kaj hop al la subtegmento rigardi miajn poŝtmarkojn. Mi estis tiom malfortiĝinta, ke apenaŭ mi levis fermilon de la kesto. Sed la kesto estis malplena; skatolo kun la poŝtmarkoj estis for.

Ne eblas al mi priskribi al vi miajn dolorojn kaj teruron. Mi opinias, ke mi staris tie kiel ŝtoniĝinta kaj eĉ ne plori mi povis pro la kunpremiĝinta gorĝo. Unue, terura estis, ke miaj poŝtmarkoj, mia plej granda ĝojo, estas for; sed ankoraŭ pli terura estis, ke certe ŝtelis ilin Aloĉjo, mia sola amiko, dum mi malsanis. Ĝi estis hororo, disreviĝo, malespero, aflikto - aŭskultu, estas miriga, kion infano kapablas travivi.

A zatim na mne venku čekal Lojzík, a když jsem konečně vylezl, šeptal jsem hned ve dveřích: Lojzo, Lojziku, byl tam jeden Hannover! - Máš ho? - Mám! - a už jsme upalovali s tou kořistí domů, do naší truhly. Tam u nás byly textilní fabriky na všelijaké šmízo, na jutu, kaliko, kartoun a bavlněný šmejd; tenhle póvl se totiž extra u nás vyrábí pro barevná plemena celé zeměkoule. Tak tam mně dovolili, abych hledal známky v koších na papír; to bylo mé nejbohatší loviště; tam se vám našel Siam a Jižní Afrika, Čína, Libérie, Afganistan, Borneo, Brazílie, Nový Zéland, Indie, Kongo - já nevím, zní-li vám už ta pouhá jména tak tajemně a jakoby toužebně. Bože, ta radost, ta ukrutná radost, když jsem našel třeba známku se Straits Settlements - Nebo Korea! Nepál! Nová Guinea! Sierra Leone! Madagaskar! Poslyšte, to uchvácení může pochopit jenom lovec nebo hledač pokladů nebo archeolog, který dělá tyhle vykopávky. Hledat a najít, to je to největší napětí a uspokojení, které může člověku život poskytnout. Každý člověk by měl něco hledat; když ne známky, tedy pravdu nebo zlaté kapradí nebo aspoň kamenné šípy a popelnice.

Teda to byla ta nejkrásnější léta mého života, to přátelství s Lojzíkem a sbírání známek. Potom jsem dostal spálu, a Lojzika ke mně nepustili, třeba stával u nás na chodbě a pískal, abych ho slyšel. Jednou na mne nedali pozor nebo co; zkrátka utekl jsem z postele a šups na půdu podívat se na své známky. Já byl tak zesláblý, že jsem stěží uzvedl víko té truhly. Ale truhla byla prázdná; krabice se známkami byla pryč.

Já vám tu svou bolest a hrůzu nemůžu vylíčit. Myslím, že jsem tam stál jako zkamenělý a že jsem nemohl ani plakat, jak mně to sevřelo hrdlo. Předně hrozné bylo, že mé známky, má největší radost, jsou pryč; ale ještě hroznější bylo, že mně je jistě ukradl Lojzík, můj jediný přítel, zatímco jsem stonal. Byl to úděs, zklamání, zoufalství, lítost - poslyšte, to je úžasné, co takové dítě dovede prožít.

Kiel mi eliris el la subtegmento, tion mi ne scias plu; sed poste mi kuŝis en grandaj febroj kaj en la pli klaraj momentoj mi malespere meditis: Nek al la patro, nek al la onklino mi ion diris - la panjon mi ne plu havis; mi sciis, ke ili tute ne komprenas min kaj tiel mi fremdiĝis al ili; ekde tiu tempo mi havis al ili nenian pli intiman infanan rilaton.

Perfido de Aloĉjo, tio estis por mi preskaŭ mortbato; ĝi estis mia unua kaj la plej granda senreviĝo pri homo. Mizerulo, mi diradis al mi, Aloĉjo estas mizerulo kaj tial li ŝtelas; jen mi havas, ke mi amikis kun mizerulo. Kaj tio faris min senkompata; ekde tiu tempo mi komencis fari diferencon inter homoj, mi perdis staton de sociala senkulpeco; sed tiam ankoraŭ mi ne sciis, kiom profunde ĝi ŝokis min kaj kio rubiĝis en mi.

Kiam mi resaniĝis post febroj, ankaŭ mi resaniĝis el la doloro pro perdo de la poŝtmark-kolekto. Nur ekfrostis min en la koro, kiam mi vidis, ke Aloĉjo havas jam novajn amikojn; sed kiam li alkuris al mi, iom embarasa post tiel longa tempo, mi diris al li seke kaj neinfane: For de mi, mi ne parolas kun vi. Aloĉjo ruĝiĝis kaj post tempeto diris: Ankaŭ bone. Kaj ekde tiu tempo li malamis min obstine kaj prolete.

Do, jen la evento, kiu influis mian tutan vivon, mian vivelekton, kiel dirus ĉeestanta sinjoro Paulus. Por tiel diri, mia mondo estis profanita; mi perdis konfidon al la homoj; mi ellernis malami kaj malestimi. Neniam plu mi havis kunulon; kaj maturiĝante mi eĉ fieris pri tio, ke mi estas soleca, ke mi neniun bezonas kaj neniun pardonas. Poste mi konstatis, ke neniun min amas; tion mi klarigis al mi jene, ke mi mem malrespektas la amon kaj kraĉas sur ĉian sentimentalecon. Kaj tiel mi iĝis orgojla, kaj honoravida, egoista, pedanta kaj entute korekta homo; mi estis malbona kaj senkompata al la subalternuloj; mi edziĝis sen la amo, infanojn mi edukadis en disciplino kaj timo kaj pro mia diligenteco kaj skrupuleco mi akiris ne malgrandajn meritojn.

Jak jsem se z té půdy dostal, to už nevím; ale pak jsem zas ležel ve vysokých horečkách a v jasnějších chvílích jsem zoufale přemýšlel. Otcí ani tetě jsem o tom neřekl - maminku jsem už neměl; věděl jsem, že mi vůbec nerozumějí, a tím jsem se jim jaksi odcizil; od té doby jsem k nim už neměl žádný bližší dětský vztah.

Lojzíkova zrada, to byla pro mne skoro smrtelná rána; bylo to mé první a největší zklamání v člověku. Žebrák, říkal jsem si, Lojzík je žebrák, a proto krade; to mám z toho, že jsem kamarádil se žebřákem. A to mě zatvrdilo; od té doby jsem začal dělat rozdíl mezi lidmi, ztratil jsem stav sociální nevinnosti; ale tehdy jsem ještě nevěděl, jak to mnou hluboko otřásl a co všechno se ve mně sesulo.

Když jsem se vystonal z horeček, vystonal jsem se i z té bolesti nad ztrátou sbírky známek. Jen mě ještě bodlo u srdce, když jsem viděl, že Lojzík má zatím nové kamarády; ale když ke mně přiběhl, trochu rozpačitý po tak dlouhé době, řekl jsem mu suše a dospěle: Táhni, já s tebou nemluvíím. Lojzík zrudl a po chvíli řekl: Taky dobře. A od té doby mě tak zarytě a proletářsky nenáviděl.

Teda to byla ta událost, která měla vliv na můj celý život, na můj výběr života, jak by řekl tady pan Paulus. Abych tak řekl, můj svět byl znesvěcen; ztratil jsem důvěru k lidem; naučil jsem se nenávidět a pohrdat. Už jsem nikdy neměl druhá; a když jsem dospíval, začal jsem si i zakládat na tom, že jsem sám, že nikoho nepotřebuju a nikomu nic nedaruju. Potom jsem shledával, že mě nikdo nemá rád; to jsem si vykládal tak, že já sám pohrdám láskou a kašlu na všechnu sentimentalitu. A tak se ze mne stal pyšný a cti bažný, sebedbalý, pedantický a vůbec korektní člověk; byl jsem zlý a tvrdý na podřízené; ženil jsem se bez lásky, děti jsem vychovával v kázni a strachu a získal jsem si svou píli a svědomitostí nemalých zásluh.

Tia estis mia tuta vivo, mia tuta vivo; mi vidis nenion alian, nur tion, kio estis mia devo. Kiam finiĝos mia vivo, oni povos legi en ĵurnaloj, kia meritplena laboranto kaj modela karaktero mi estis. Sed se oni scius, kiom da soleco, malkonfido kaj obstino enestas!

Antaŭ tri jaroj mortis mia edzino. Mi konfesis tion nek al mi, nek al iu alia, sed estis al mi terure triste; kaj en tia melankolio mi eltiris diversajn familiajn memoraĵojn, restintajn post la patro kaj patrino: fotojn, leterojn, miajn malnovajn lerneĵojn - mi sentis premon eĉ en la gorĝo vidinte, kiel zorgeme mia severa paĉjo ilin deponadis kaj kaŝadis; mi opinias, ke tamen li amis min. En la subtegmento estis plena ŝranko da tiaj aĵoj; kaj sur fundo de ia tirkesto estis skatolo, sigelita per sigelmarkoj de mia patro; malferminte ĝin mi trovis en ĝi la kolekton de poŝtmarkoj, kiun mi faris antaŭ kvindek jaroj.

Nenion mi malkonfesis al vi: torente mi eklarmis, kaj la skatolon mi forportis en la ĉambron kiel trezoron. Do tiel ĝi tiam estis, tuj mi ekkomprenis; kiam mi malsanis, tiam iu trovis mian kolekton kaj la patro ĝin konfiskis, por ke mi pro ĝi ne neglektu la lernadon! Li devis ne fari tion; sed ankaŭ en tio estis lia severa zorgemo kaj amo; mi ne scias, sed mi komencis bedaŭri kiel lin tiel min.

Kaj poste mi rememoris: Aloĉjo ne ŝtelis do miajn poŝtmarkojn! Jesuo Kristo, kiom mi maljustumis lin! Denove mi vidis antaŭ mi la lentugan kaj taŭzitan stratbubon - Dio scias, kio li fariĝis kaj ĉu ankoraŭ li vivas! Al mi estis ĝene kaj hontige reimagante ĉion ĉi al mi.

Pro la unusola falsa suspekto mi perdis ununuran amikon; pro tio mi perdis mian junaĝon. Pro tio mi komencis malestimi la malriĉan ularon; pro tio mi kondutis fieraĉe; pro tio mi al neniuj korligiĝis. Pro tio dum mia tuta vivo mi ne povis rigardi poŝtmarkon sen antipatio kaj naŭzo. Pro tio neniam mi skribis al mia fianĉino kaj edzino, maskante tion, ke mi estas altigita super sento-elverŝoj; kaj mia edzino suferis pro tio.

To byl můj život, můj celý život; já se nedíval na nic než na to, co je má povinnost. Až v Pánu dokonám, ono to bude i v novinách, jaký jsem byl zasloužilý pracovník a vzorný charakter. Ale kdyby lidé věděli, co je v tom samoty, nedůvěry a zatvrzelosti!

Před třemi roky mně zemřela žena. Já to nepřiznal sobě ani jiným, ale bylo mně hrozně smutno; a z takového stesku jsem vyhrabal všelijaké rodinné památky, co zůstaly po otci a matce: fotografie, dopisy, mé staré školní sešity - to mě až škrtilo v krku, když jsem viděl, jak pečlivě je můj přísný tatík ukládal a schovával; myslím, že mě přece měl rád. Byla toho na půdě plná skříň; a na dně jedné zásuvky byla škatule, zapečetěná pečeti mého otce; když jsem ji otevřel, našel jsem v ní tu sbírku známek, kterou jsem si dělal před padesáti lety.

Já vám nebudu nic zapírat; mně proudem vyhrkly slzy, a tu krabici jsem si odnesl do pokoje jako poklad. Tedy tak to tehdy bylo, pochopil jsem v tu ránu; když jsem tenkrát stonal, někdo tu mou sbírku našel a otec ji zkonfiskoval, abych kvůli ní nezanedbával učení! Neměl to dělat; ale i v tom byla taková jeho přísná péče a láska; já nevím, ale mně začalo být líto i jeho, i sebe.

A pak jsem si vzpomněl: Tedy Lojzík mně ty známky neukradl! Kristepane, jak já mu křivdil! Zas jsem viděl před sebou toho pihovatého a rozdrbaného uličníka - Bůhví, co se z něho stalo a je-li ještě živ! Mně vám bylo tak trapno a stydno, když jsem si to všechno vybavoval.

Pro to jediné křivé podezření jsem ztratil jediného kamaráda; pro to jsem ztratil dětství. Pro to jsem začal pohrdat chudou verbeží; pro to jsem se choval nadutě; pro to jsem už k nikomu nepřilnul. Pro to jsem se po celý život nemohl podívat na poštovní známku bez nechuti a odporu. Pro to jsem nikdy nepsal své nevěstě a ženě a maskoval jsem to tím, že jsem povýšen nad citové výlevy; a má žena tím trpěla.

Pro tio mi estis tiom senkompata kaj soleca. Pro tio kaj nur pro tio mi faris tian karieron kaj plenumadis tiom modele miajn devojn. Mi vidis denove mian tutan vivon; subite ĝi ŝajnis al mi senseca. Ja mi povis tute alie vivi, mi ekpensis. Se ĉi tio ne estus okazinta - en mi estis tiom da entuziasmo kaj aventuremo, amo, kavalireco, fantazio kaj konfido, iaj strangaj kaj nebrideblaj aferoj - dio, ja mi povis esti kio ajn alia, mondvojaĝanto aŭ aktoro aŭ soldato! Ja mi povis ami la homojn, trinki kun ili, kompreni ilin, mi ne scias, kion alian. Estis al mi, kvazaŭ degelus en mi glacio. Mi rigardis poŝtmarkon post poŝtmarko; ĉiuj tie estis, Lombardio, Kubo, Siamo, Hanovero, Nikaragvo, Filipinoj, ĉiuj landoj, al kiuj mi volis tiam vojaĝi kaj kiujn mi ne plu vidis. Sur ĉiu poŝtmarko estis peco de io, kio povis okazi kaj kio ne okazis. Mi sidpasigis super ili la tutan nokton kaj juĝis mian vivon. Mi vidis, ke ĝi estis ia fremda, artefarita kaj nepersona vivo, ke mia efektiva vivo tute ne realiĝis.“

Sinjoro Karas mansvingis. „Kiam nur mi ekpensas, kio ĉio mi povis esti kaj kiom mi maljustumis Aloĉjon - " Pastro Voves, aŭskultante tiun ĉi rakonton ege tristiĝis kaj afliktiĝis; plej versimile li rememoris ion el sia propra vivo. „Sinjoro Karas," li diris kortuŝite, „ne pensu plu pri tio; neniam helpo, nun ĝi ne estas rebonigebla, ne eblas komenci denove -" „Ne eblas," suspiris sinjoro Karas kaj iomete ekruĝis. „Sed, sciu, almenaŭ - almenaŭ la kolekton mi komencis denove fari!"

Pro to jsem byl tak tvrdý a osamělý. Pro to, jen pro to jsem udělal takovou kariéru a plnil tak vzorně své povinnosti. Já viděl znovu celý svůj život; najednou se mi zdál pustý a nesmyslný. Vždyť já mohl žít docela jinak, napadlo mě. Kdyby se to nebylo stalo, bylo ve mně tolik nadšení a dobrodružnosti, lásky, rytířství, fantazu a důvěry, takových věcí divných a nezkrotných - bože, vždyť já mohl být čímkoliv jiným, cestovatelem nebo hercem nebo vojákem! Vždyť jsem mohl milovat lidi, pít s nimi, rozumět jim, já nevím co všechno! Mně bylo, jako by ve mně roztával nějaký led. Probíral jsem známku po známce; byly tam všechny, Lombardie, Kuba, Siam, Hannover, Nicaragua, Filipíny, všechny ty země, do kterých jsem tehdy chtěl jet a které teď už neuvídím. Na každé té známce bylo kus něčeho, co se mohlo stát a co se nestalo. Já nad nimi proseděl celou noc a soudil jsem svůj život. Viděl jsem, že to byl nějaký cizí, umělý a neosobní život, a že můj skutečný život se vůbec nestal skutkem.“

Pan Karas mávl rukou. „Když si tak pomyslím, čím vším jsem mohl být, a jak jsem tomu Lojzíkovi křivdil - “ Páter Voves, naslouchaje této řeči, se velmi zasmušil a rozlítostnil; nejspíš si vzpomněl na něco ve svém vlastním životě. „Pane Karas," řekl dojatě, „ani na to nemyslete; co je to platno, teď už se to nedá napravit, nedá se začít znova.“ „Nedá," vzdychl pan Karas a drobet se zarděl. „Ale víte, aspoň - aspoň tu sbírku jsem začal znovu dělat!"